

sub la suda kruco ★

# ESPERANTO



La 94a UK en Bjalistoko


Nov-Zelando realigita revo de  
junulo



Vizito al Nov-Kaledonio

Raporto pri la Aŭstralia Esperanto-  
Kongreso, 2009

oficiala organo de la aŭstralia kaj nov-zelanda esperanto-asocioj  
volumo 17 [4] • numero 100 • decembro 2009  
ISSN 1038-9380



ESPERANTO

## SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIOJ

volumo 17 [4] • numero 100 • decembro 2009

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktoroj | Chris Krügeloh & Šandor Monostori

Kontaktadreso | [esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)

P.O. Box 1097

Bendigo Central, Vic 3552, Australia

### Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub La Suda Kruco estas aŭtomate sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | [www.esperanto.org.au](http://www.esperanto.org.au) — [info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au)

NZEa | [www.esperanto.org.nz](http://www.esperanto.org.nz) — [nzea@esperanto.org.nz](mailto:nzea@esperanto.org.nz)

### Kiel kontribui al ESK


Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunktoj, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "[esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)".

Limdato por kontribuoj por la sekva numero:

15 de februaro 2009

La redaktoro rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj  
en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.  
Ili ne necese spegulas la opiniojn  
aŭ de AEA, aŭ de NZEA.**



**Sur la kovrilo:** Okaze de la 94a UK en Bjalistiko, videblis Esperantaj kaj polaj flagoj kaj la flagoj de la urbo ĉe la peronoj de la trajnstacidomo kaj la stratoj de la urbocentro (fotoj de Chris Krügeloh).

# Enhavo



Nov-Zelando - realigita revo de junulo

**8**

**Nekrologo: d-ro Joe Somogyi**



Ĉe la piedoj de la estimata d-ro Zamenhof



**Floroj kaj kantoj en Adelajdo**



Raporto pri la Aŭstralia Esperanto-Kongreso 2009



**Vizito al Nov-Kaledonio**



**Kvargeneracia Esperanto-familio**



**Revekiĝo de Bjalistoko, Pollando**



**La 94a UK en Bjalistoko**

decembro du mil naŭ

# Antaŭparolo

Mi sincere petas vian pardonon pro la malfruo de ĉi tiu eldono de *ESK*. Kiam vi legos ĉi tiun antaŭparolon jam estos 2010. Mi esperas ke vi havis feliĉan festan kaj ferian periodon. Mi sekvigos miajn novjarajn bondezirojn per la novjara tosto de la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio (*UEA*).

Amike

*Chris Krügeloh*

## NOVJARA TOSTO DE LA PREZIDANTO DE UEA

*Karaj kuntostantoj al la postjubilea nova jaro!*

*Ni tostas hodiaŭ al nia dokumenta lingvo. Kiam (la en 2009 jubileinta) Lazaro Ludoviko Zamenhof kunmarŝis kun ni sur la valon de la homa egaldigno en 1887, li kreis dokumentan lingvon. Ĝian ĉifron vi povas paki en absurde malpezan broŝureton, en 'ŝlosilon'. Se vi volas, vi povas eĉ sendi dokumenton al homo, kiu ne lernos la lingvon, sed nur devos deĉifri per sialingva ŝlosilo vian dokumenton.*

*Hodiaŭ ni tostas al nia monumenta lingvo. Kiam (la en 2009 kunjubileinta) Ivo Lapenna grimpis por ni la monton de Montevideo en 1954, la movado gvidata de li sentis la bezonon pruvi sian lingvon kapabla konstrui monumentojn, kapabla ĉiufake funkcii same delikate, same precize, kiel aliaj kandidatoj por la rolo de interŝtata lingvo.*

*Ni hodiaŭ tostas al lingvo, kiu laboras ponte inter tiuj du skaloj. Neniu lingvo malpli supra povus porti tiel delikatan devaron, ekde simpla dokumenteco, pere de majesta monumenteco, ĝis la respondeco ponti inter la simplemo kaj la majestemo.*

*Tostas ni hodiaŭ al tiuj, kies inspireco faris el la lingvo personan spertaron disdirendan ankaŭ al tiuj niaj najbaroj, kiuj ne lernis ĝin. UEA lanĉas por la ekanta jardeko Projekton Vizaĝoj – ne malplej per tiu ĉi mesaĝo – kiu spronu vin verki dokumentojn, skulpti monumentojn, por diskonatigi krom Zamenhof kaj Lapenna ankaŭ la multajn prirakontindajn vizaĝojn de la Esperanta mondo. "Vivos eterne pri ili memor!" nur se aperos pri ili materialo biografia – aŭ, se vi preferas, viv-libr-a – vikipedie, foirbude, volumege, broŝurete, do en la tuta bunto de nia repertuaro. Lande, fake, loke, eĉ eksterasocie, kunvizaĝumu kun ni!*

*Probal Dasgupta  
Prezidanto de UEA*

The logo for the Universal Esperanto Association (UEA) features the lowercase letters 'uea' in a yellow, cursive font. The letters are positioned over a blue circular background that is partially obscured by an orange vertical rectangle on the left side.

uea

# Universala Esperanto-Asocio

## Membrigu al UEA!

Kiel membro de *UEA* vi apartenas al komunumo de esperantistoj en 120 landoj.

Aŭstralia Esperanto-Asocio membras en Universala Esperanto-Asocio de 1942. Ĉi-jare ni havas 48 esperantistojn, kiuj individue membras en *UEA*. Tridek tri el ili estas jarkotizantaj, 15 dumvivaj kaj honoraj membroj. Ĉu ne tute klaras kion tiuj kategorioj signifas?

Jaran kotizon oni pagas, kiam oni volas esti ekzemple *Membro kun Gvidlibro (MG)*. Al aŭstraliano tio kostas nur A\$16, kaj li aŭ ŝi ricevas la *Gvidlibron* tra la Esperanto-movado, kiu enhavas la ĉiujare aktualigitajn informojn pri ĉiuj ĉefaj agadoj de *UEA*, ĝiaj oficejoj kaj institucioj, la nomojn, adresojn kaj taskojn de ĉiu komitatano, komisiito kaj aliaj respondeculoj de la asocio, adresojn kaj mallongajn priskribojn de ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj, kulturaj kaj sciencaj institucioj, ktp. Se vi deziras ricevi la kompletan *Jarlibron* (*Gvidlibron* plus la adresaron de la tutmonda delegita reto kun nomoj, adresoj kaj fakoj de preskaŭ 1800 delegitoj kaj fakdelegitoj), aliĝu al *UEA* en kategorio *MJ* (Individa Membro kun Jarlibro) pagante A\$40.

Por havi kaj la *Jarlibron* kaj la jaran abonon al la monata organo de *UEA*, revuo *Esperanto*, aŭstraliano pagu A\$100.

Estas pliaj variaĵoj de membreco (ekzemple por junuloj), elekteblaj konforme al viaj aĝo, bezonoj, kaj monujo. Eĉ se vi elektas la plej malmultekostan kategorion (*GM*), vi iĝas membro de reprezenta, grava organizo, ricevas amason da informoj kaj kaze de via intereso pri *Universala Kongreso* (la venontjara estos en Havano) malplialtan aliĝkotizon!

Pliaj detaloj troveblas en la retpaĝo de *UEA* ([www.uea.org](http://www.uea.org))

aŭ ĉe la aŭstralia ĉefdelegito de *UEA*: [katja.steele@gmail.com](mailto:katja.steele@gmail.com) ★

---

Katja Steele

# Nov-Zelando

## realigita revo de junulo

de Detlev Blanke

Tre prave la redaktoro Chris Krägeloh en la junia kajero (2009) klopodis informi pri kelkaj belaĵoj de Nov-Zelando. Valorus fari multe pli, kvankam tio certe estus malfacila klopodo. Oni ja bezonus ĉiumonate dikegan kajeron, por sukcesi prezenti eĉ nur parton de tiuj unikaj pejzaĝoj...

Kiel la legantoj el la sama kajero jam eksciis, mia edzino Wera kaj mi restadis en NZ kaj povis konatiĝi kun multaj regionoj de la lando. Kulpas Esperanto, ĉar nia vojaĝo (27.2. – 7.4.2009) grandparte ŝuldiĝas al revo de junulo. Kiel juna esperantisto (ekde 1957) mi multe korespondadis. Mia plej fora korespondamiko estis el NZ, por mi la plej ekzotika insula regno de la mondo. La korespondaj ligoj daŭris ĝis fino de la 60aj jaroj de la lasta jarcento. Mi ne havis ideon, ke post pli ol 40 jaroj mi vizitos NZ kaj persone interkonatiĝos kun tiu iama korespondamiko, Bevan Clarke, siatempe financoficisto kaj nun profesoro pri ekonomio ĉe la Universitato de *Christchurch*.

Helpis la hazardo: Nenion sciante pri nia plano viziti NZ, Chris Krägeloh en 2008 membriĝis al la germana scienca societo pri interlingvistiko, kiun mi gvidas ekde 1991. Je nia granda bonŝanco: Li helpis trovi Bevan. Krom tio dum niaj du restadoj en *Auckland* Chris multe klerigis nin pri NZ, aparte pri la maorioj kun siaj lingvo kaj kulturo, kaj ekskursigis nin al rave belaj regionoj norde de *Auckland*.

Nia vojaĝo trovis esperantistan helpon jam antaŭ la alveno en *Auckland*. Nia flugo unue iris de Londono al Hongkongo, kie nin faksperite gvidis malnova amiko, la sinologo kaj interlingvisto, Donald Gasper, kun kiu mi konatiĝis jam dum la 1970-aj jaroj kaj kelkfoje renkontiĝis kun li dum internaciaj aranĝoj.

Retrorigarde: Ni vere estis ege bonŝancaj. Ni ne nur havis afablajn helpantojn dum nia vojaĝo, sed ankaŭ sukcesis senakcidente alveni al niaj celoj per la luita aŭto, malgraŭ maldekstra trafiko (unue iom



*Dekstre: Donald Gasper kaj Wera Blanke en Hongkongo.*



*Supre: Bevan kaj Velma Clarke kaj  
Detlev Blanke.  
Dekstre: Chris Krägeloh kaj Detlev.*

gvidis al la duoninsulo *Banks* kun la pitoreska *Akaroa*

Per aviadilo ni fine reatingis *Auckland*, kie Chris Krägeloh i.a. nin gvidis al klubvespero de la Esperanto-grupo. Tie ni konatiĝis kun Brian Fox kaj edzino Jackie, Bradley McDonald, Howard Gravatt kaj aliaj.



Resume: Neforgeseblaj impresoj pri la plej longa vojaĝo de nia vivo kaj miloj da fotoj. Se ni estus pli junaj, ni ofte revenus. Specialan dankon al Don, Chris, Velma kaj Bevan. ★

**Detlev Blanke** multe verkas pri interlingvistiko kaj aktivas sciencorganize. Li estas prezidanto de *Gesellschaft für Interlinguistik e.V.* (societo pri interlingvistiko, vidu [www.interlinguistik-gil.de](http://www.interlinguistik-gil.de)).

**Wera Blanke** sin multe engaĝis por la plibonigo de la terminologia agado en Esperanto kaj verkis pri tio.

Noto de la redaktoro: Multe helpis min Erin McGifford trovi la kontaktadreson de Bevan Clarke.

# Nekrologo: d-ro Joe Somogyi

31/12/1925 – 07/11/2009

Jozsef Laszlo Ferenc Somogyi naskiĝis en Hungarujo. Jam iom kapabla en la latina, li eklernis Esperanton en 1937, kiam li estis medicina studento en *Pecs* Universitato. Tie li konsciis pri la internacia lingvo, kiam vizitanto el *Anglia* universitato (fakte studento el *Nigerio*), por financi siajn feriajn vojaĝojn en Eŭropo, paroladis en Esperanto, utiligante lokajn interpretistojn. Tiu homo inspiris en Jozefo aprezon por tiu logika, universala lingvo, kun fonetika literumo kaj simpla gramatiko, facile lernebla de iu ajn. Lia dumviva intereso en ĝi, kun ĝia homameco, kaj ĉiuj el la geamikoj kiujn li renkontis kaj la avantaĝojn kiujn li profitis el ĝi, baziĝis en tiu unua parolado.

Jozsef eklernis la lingvon per lernolibro, kaj tuj komencis korespondi kun esperantistoj en *Finlando*, *Pollando*, *Bulgario*, *Francio* kaj *Kubo*. Post la dua mondmilito lia intereso daŭris, kaj ĝis la fino de lia vivo li interkorespondadis precipe kun homoj en *Sud-Ameriko* (La junulo ankaŭ komencis lerni piloti aviadilojn, je la aĝo 14!).

Dum lia studado en *Pecs*, trafis la dua mondmilito. Pro tio, ke li kaj liaj amikoj helpis kelkajn rusajn militajn malliberulojn, ili estis "gastoj" de la *Gestapo* dum kelkaj semajnoj. Tiuj bategis kaj torturis la junulojn, kaj mortkondamnis ilin. La ekzekuto devus okazi je la sunleviĝo de la 25a de novembro 1944. Sed dum la antaŭa nokto, la rusoj bombardis la urbon kaj la prizonon! Jozsef kaj la aliaj eskapis. Dum la tuta vivo, tamen, li suferis vertebrajn problemojn.

Jozsef sin trovis ia heroo kiam li revenis al sia hejmurbo. Sed post kelka tempo, necesis eskapi ankaŭ la "kamaradojn" kiuj regis post la fuĝo de la germanoj. Pri la aventuro kun sia unua edzino, el *Hungario* tra Eŭropo ĝis *Adelajdo*, kun la helpo de esperantistoj en diversaj landoj, oni povas legi kvazaŭ romanon. Joe (Jozsef) verkis kelkajn ĉapitrojn pri sia juna vivo por liaj filoj kiam, jam en rulseĝo pro la parkinsona malsano, li sentis, ke la fino alproksimiĝas.

En 1949, Jozsef enmigris en *Sud-Aŭstralio*, kaj post jaroj da laboro akiris la necesan monon por rekomenci sian studadon en, kaj diplomigon el, la medicina fakultato en la *Universitato de Adelajdo*.

Plaĉegis al li redoni iom de la helpo kaj gastigo kiun li ricevis tra la jaroj de tiom da samideanoj en diversaj landoj. Nelonge post lia alveno en *Aŭstralio*, lia nomo aperis en la *UEA Jarlibro*. Kiam li kaj lia dua edzino, *Patsy*, translokiĝis al *Okcidenta Aŭstralio*, li kontaktis nin en *Perto*, sed dum kelkaj jaroj ni konis D-ron Somogyi nur perkoresponde ĉar la familio loĝis en la fora nordo, en *Port Hedland*. Kelkajn jarojn poste, Joe fariĝis anestezisto en *Hong Kongo*, kaj post tio la familio vivis en *Vanuatuo*. Kiam ili venis al *Perto*, ni finfine renkontis tiun afablan homon kaj lian ĉarman duan edzinon, *Patsy*, patrinon de iliaj du filoj. Dum la plimulto de sia vivo Joe estis ano de *ELOA*, de *AEA* kaj de *UEA*, en kiu li estis fakdelegito pri medicino.

Joe mortis antaŭ ol fini la membiografion, sed baldaŭ *Patsy* verkos la aŭstralian parton de la sagao. Ni kiuj konis lin, memoros ĝentilan, inteligentan, gastigeman grandanimulon. Restu en paco, kara amiko. Elkorajn kondolencojn al *Patsy*, *Simon* kaj *Nick*. ★

---

Vera Payne



# Ĉe la piedoj de la estimata d-ro Zamenhof

de Petro Danzer

Estis nur antaŭ ne longe, ke mi legis broŝuron el Ĉinio nomite *La Vivo de Zamenhof*. Dum jaroj mi provis sekvi la spiritan vojon per praktikaj rimedoj, kaj ĉi tiu volumeto kortuŝis min. La vizio, la grand-

animeco, la sopiroj por paco kaj frateco de la homaro montrante de Zamenhof, ili estas kiel signalfajro dum ĉi tiu epoko. Ĉirkaŭ ni videbliĝas la kolapso de la malnova mondo-ordo. Etiko, moraleco kaj spiritaj leĝoj en multaj landoj iĝas subfosataj, ignorataj kaj atakataj. Kia nenecesa sufero en nia tergloba vilaĝo, nia planedo. Kio ŝanĝiĝis dum unu kaj duona jarcento de kiam nia amata iniciatinto de Esperanto, Ludoviko Lazaro Zamenhof

naskiĝis en Bjalistoko? Edmond Privat skribis: "Sur litva tero kvar gentoj malsamaj loĝadis en urboj, kun celoj kontraŭaj, kun lingvoj diversaj, kun kredoj malamikaj. De strato al strato ja regis malfido, suspekto, sur placoj ofendo ĉiutaga, venĝemo, persekuto kaj malamo. Sur tiu tero malfeliĉa naskiĝis Zamenhof. En kiu koro pli nature alkreskus tia geniulo, kies vido pli profunden trapenetrus, kaj pli alten superflugis trans naciaj egoismoj al pure homa mondrigardo?" Kiel mi admiras la grandanimecon de Nelson

Mandela pardoni liajn gardistojn kaj malbonvolulojn, tiel mi estis timfrapita de la animeco de Zamenhof kontraŭ ĉiuj. Li eĉ permesis, aŭ pli bone kuraĝigis ŝanĝojn al la bazo de Esperanto mem per aŭtoritata

komitato. D-ro Zamenhof skribis en 1888:

"Mi ne volas eldoni aŭtore plenan vortaron kaj krei laŭ mia persona plaĉo la tutan lingvon de la kapo ĝis la piedoj...Kiam la lingvo sufiĉe fortiĝos kaj ĝia literaturo sufiĉe vastiĝos, tiam ankaŭ tio, kio estas mia broŝuro, devas perdi ĉian signifon, kaj sole kompetentaj tiam devos esti la leĝoj de la plejmulto...Ĉio bonigebla estos bonigata per la konsiloj de la mondo. Mi ne volas esti kreinto de lingvo, mi volas nur esti

iniciatoro...Kompetenta devas esti de nun, ne la aŭtoro aŭ ia alia persono; la solaj kompetentaj nun devas esti: talento, logiko, kaj la leĝoj kreitaj de la plej granda parto de la verkantoj kaj parolantoj...la Lingvo Internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj".

Ĉar mi komencis mian spiritan vojon ĉirkaŭ samtempe kiam mi unue eksciis pri Esperanto, mi estas entuziasmo-plena de la vortoj de Zamenhof el la kongresa parolado

**"La vizio, la grand-  
animeco, la sopiroj  
por paco kaj frateco  
de la homaro  
montrante de  
Zamenhof, ili estis  
kiel signalfajro dum  
ĉi tiu epoko."**

kongresa parolado ĉe Bulonjo-sur-Maró en 1905. Ĉi tie, li diris: "Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas...Ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio, kaj la unuan fojon en la homa historio, ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud la alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj, kiuj ne altrudante unu al alia sian ligvon komprenas sin reciproke, ne suspektas unu la alian pro mallumo ilin dividanta, amas sin reciproke kaj premas al si reciproke la manojn ne hipokrite, kiel alianaciano al alinaciano, sed sincere, kiel homo al homo. Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maró kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago, kaj grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj!...Baldaŭ komenciĝos la laboroj de nia kongreso, dediĉita al vera fratigo de la homaro. En tiu ĉiu solena momento mia koro estas plena de io nedifinebla kaj mistera kaj mi sentas la deziron faciligi la koron per ia preĝo, turni min al iu plej alta forto kaj alvoki ĝian helpon kaj benon. Sed tiel same kiel mi en la nuna momento ne estas ia naciano, sed simpla homo, tielsame mi ankaŭ sentas, ke en tiu ĉi momento mi ne apartenas al ia nacia aŭ partia religio, sed mi estas nur homo."

**"Rompu, rompu la murojn inter la popoloj."**

Ĉe la 1906 Kongreso en Genevo li diris: "Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi, en la urbo Bjalistok, rigardadis kun doloro la reciprokan fremdecon, kiu dividas inter si la naturajn filojn de sama lando kaj sama urbo. Kaj mi revis tiam, ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio sanĝiĝos kaj boniĝos...Mi ne volas rakonti al vi la terurajn detalojn de la bestega Bjalistoka buĉado; al vi kiel al esperantistoj mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas. ROMPU, ROMPU LA MUROJN INTER LA POPOLOJ... "Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke la laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun Lingvo Internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo - vi ĉiuj sentas ĝin tre bone - estas frateco kaj

justeco inter ĉiuj popoloj...". Ĉe la kongresoj en *Dresden* (1908) kaj *Washington* (1910) Zamenhof montris, ke lingvoj maturiĝas senhalte sed sen subitaj ŝanĝoj. Malnovaj folioj falas, kaj novaj folioj ekaperas. Floroj kaj fruktoj multiĝas. Novaj branĉoj ekaperas, kaj la trunko mem kreskas, sed la arbo samrestas. La ĉiam-modesta iniciatoro de Esperanto laboris sen ripozo por la bono de la homaro. Ni ĉiuj provu sincere sekvi liajn paŝojn. Lasu nin unuiĝitaj kaj ne-egoisme entreprenitaj pri ĉi tiu granda entrepreno alkonduki Esperanton al suferanta mondo. Antaŭ longe, mi legis la verson "Du viroj rigardas tra la baroj - unu vidas la koton, la alia la stelojn". Ĉiuj grandaj movadoj, organizoj, societoj havas pozitivan energion, kiuj filtras negativajn fortojn. Malkaŝa, neantaŭinfluita kaj amata konsilo sen pasio aŭ malico estas la fundamentaĵo de ĉio. Ĉi tiu postulas respekton, bonkorecon, moralan kuraĝon kaj humilecon. Decido atingita per ĉi tiu maniero estas preferata al malunueco. Unueco de intenco! Unueco super ĉio! Do, ni rigardu la stelojn en la ĉielo de kompreno! En la vortoj de nia majstro, Ludoviko L. Zamenhof: ROMPU, ROMPU LA MUROJN INTER LA POPOLOJ. ★

---

#### Literaturo:

Edmond Privat: *La Vivo de Zamenhof*

Paul Desailly: *Making World Peace Real*

---



Petro komencis iri al la Esperanto-klubo en Kanbero ekde la 1980aj jaroj. Li transloĝiĝis kelkfoje en Aŭstralio, kaj estis/estas ano de la Toowoomba Esperanto-Asocio, la Brisbano Esperanto-Klubo kaj la Baha'a Esperanto Ligo.

# Floroj kaj kantoj en Adelajdo

de Katja Steele

La regulaj klubaj kunvenoj okazadas en Adelajdo ĉiun unuan merkredon de la monato en Box factory, Regent Street South. Krom tio ni organizis ĉi-jare ok apartajn aranĝojn, kiel ekzemple teatra vespero, vizito de muzea ekspozicio, ekskurso.

En septembro ni havis novspecan aktivajon: florarangadon, en oktobro jam tradician: kantvesperon. La unuan preparis Katja Steele en sia hejmo. Ŝi tre ŝatas florojn, studis en kursoj por florarangado kaj laboras en buked-fabriko. Ĉi-foje ŝi transdonis kelkajn siajn sciojn pri la temo al kvin esperantistinoj. Post la buton-bukedo kaj sekflora kristnaska aranĝo, la ĉefa programero estis preparo de surtabla florarangado en speciala ornama skatolo. La nekutima afero por la "lernantinoj" estis aranĝi la florojn ne egalnivele, kiel oni kutimas, sed en triangula pozicio kaj anstataŭ simetria divido de florspecoj grupigi ilin. Mirigis kaj ĝojigis ĉiun el ni la atingitaj rezultoj. Ekestis kvin belaj, originalaj kaj tute malsamaj aranĝoj. Evidente ne nur la gastigantino kontentis, sed ankaŭ ĉiu virino feliĉis pri sia atingo.

Dum la inoj florumis, la viroj spektis videofilmon en alia ĉambro. Ni kune trinkis kafon, babilis kaj kantis adiaŭe.

La kantvesperojn organizas en sia hejmo Indrani Beharry-Lall. Ŝi elektas la repertuaron kaj akompanas la kantadon per pianludado. Grava estas ankaŭ la tasko de Bob Felby: akompani nin per balalajko. La temo de la vespero estis la ĉi-jara vojaĝo de Indrani. Ŝi elektis por ni 21 kantojn, kiuj devenis el la landoj de ŝi vizititaj - Pollando, Norvegio, Rusio...

Plurajn el la kantoj ni tute ne aŭ nur iomete konis, sed la intenco estis ĝuste lernado de novaj kantoj. Eĉ se neniu el ni estas brila kantisto, ni ĉiuj ŝatas kanti kaj dankas Bob kaj Indrani pro la agrablaj horoj de kunkantado.★



*Supre: Margaret Furness, Audrey Felby, Carol Linnane, Nancy Roy kaj Indrani Beharry-Lall.*



# La Aŭstralia Esperanto- Kongreso 2009

de Hazel Green

Koran dankon al la organizintoj de nia kongreso en Kanbero 27-30 novembro. En bela taŭga loko, *Ursula Hall*, Kanbero, estis tri tagoj da kunvenoj, prezentoj, ludoj kaj diskutoj. Poste, pluraj el ni restis por viziti lokojn en Kanbero.

Vi jam vidis la programon en antaŭa *ESK*. Mi volas mencii du programerojn kiujn mi ĝuis eĉ pli ol mi atendis: prezentoj de grupoj, kaj *klereca lundo*. Sabatvespere, post neformalaj diskutoj pri *AEA* aferoj, diversaj Esperantaj grupoj prezentis sin per diversaj rimedoj. Mi tre admiris la grupon kiu kreis dramon nur el proverboj en la kolekto de Zamenhof. Multaj parolis, kaj eĉ homoj kiuj antaŭe ne kutimis prezenti publike en Esperanto tre sukcese prenis la okazon priskribi lokajn Esperantajn agadojn.

Lundo estis *klereca lundo*, kiu iom similis al la *kleriga tago*, kiu iĝas kutima ŝatata parto de Universalaj Kongresoj. Mi devis forte konsenti kiam mia edzo Paul diris el la koro "Tio estis ege interesa tago". Ĉiu parolanto rajtis libere elekti sian temon (kun rilato al Esperanto), kaj la rezulto estis bona miksaĵo. Ni aŭdis pri personaj spertoj en Esperantujo, kiel kuraĝigi ĝuadon, rimoj en Esperanta poezio, kaj junaj aktivuloj. Estis spontanea priskribo de interesa turista loko, kaj estis opinio pri *AEA*-kongresoj kiu estis plejparte plenda sed ofte amuza. Ankaŭ dimanĉe ni kleriĝis per ekzercoj gviditaj de Penny (instruado de infanoj) kaj Jonathan (decidado en grupo). Dankon al ĉiuj.

## The Australian Esperanto Congress 2009

by Hazel Green

Many thanks to the organisers of our congress in Canberra 27-30 November. In a great location, *Ursula Hall*, Canberra, there were 3 days of meetings, talks, performances, games and discussions. Afterwards some of us stayed to visit other parts of Canberra.

You've already seen the program in a previous *ESK*. I'd like to mention 2 items which I enjoyed even more than I expected: the presentations by Esperanto groups, and "klereca lundo". On Saturday evening, after informal discussions about *AEA* matters, various Esperanto groups presented themselves in various ways. I especially admired the group which managed to produce a small play out of proverbs in Zamenhof's collection. Many spoke during the evening, and even people not used to giving public presentations in Esperanto successfully used the chance to describe local Esperanto activities.

Monday was "klereca lundo", similar to the "kleriga tago" which is becoming a popular part of universal congresses of *UEA*. I heartily agreed when my husband Paul said sincerely "Tio estis

ege interesa tago." Each speaker was able to choose his or her own topic (with a relationship to Esperanto), and the result was a good mixture. We heard about personal experiences in Esperanto-land, how to increase enjoyment for members (including us!), rhymes in Esperanto poetry, and young activists. There was a spontaneous description of a fascinating tourist spot, and an opinion about AEA congresses which was full of complaints but often amusing. On Sunday we became more knowledgeable too, by way of exercises guided by Penny (teaching children) and Jonathan (making group decisions). Thanks to all. ★



***People who attended the Australian Esperanto Congress, 2009***

***Front row: Freya Vos, Karina Turvey, Erik Turvey***

***Seated: Roger Hill, Penny Vos, Dianne Lukes, Peter Ellyard, Jennifer Bishop, Hazel Green, Joanne Turvey***

***Front standing row: Max Wearing, Steve Pitney, Alan Turvey, Huigh Malcolm, Paul Green, Sandra Connors, Paul Gorny, Sándor Monostori, Kam Lee***

***Standing behind: Andrew Lutz, John Garvey, Miranda Lutz, Jonathan Moylan, Peter Danzer, Robert Budzul***

***Missing: Brenda Malcolm.***



*Above: Miranda, Alan, Jonathan and Andrew riding a wave shaped piece of "art" at the Australian Museum. The Radio Tower on Black Mountain can be seen in the background.*

*Below: This photo, taken in the Common room at Ursula Hall, is of Penny with her role-playing teachers, Andrew, Alan, Miranda and Jo, who used the resources from "Talking to the Whole Wide World" to instruct the rest of the participants who were taking the role of primary school children. Both the pupils and the teachers gained a lot from the experience.*



## Thanks from Diano to:

A big thank you to **Petro Ellyard**, who flew to Canberra especially to attend the Annual General Meeting of *AEA* and to share with us his plans for including Esperanto in his vision of 2050.

Also I would like to sincerely thank our hardworking Director of Implementation, **Yaw Badu**, who prepared the congress bulletin for us but unfortunately could not be with us due to work and family commitments.

I would also like to give my heartfelt thanks to **Roger Hill** and **Lou Jelinek** for driving and accommodating both Penny and myself while we have been attending to a lot of important Esperanto business around Canberra, recently.

A big thank you to **Huigh** and **Brenda** who did such a marvellous job of arranging the congress in Canberra for us.

Thank you, **Max**, for keeping me on my toes, and I hope to implement all those recommendations you have been giving me to make our next congress even better.

Also thank you to **each and everyone who attended** and helped to make this congress one of the most pleasant and comfortable congresses we have had. ★



### Movement on the Board of the Australian Esperanto Association

Long-standing supporter of Esperanto in Australia and *AEA* in particular, Kam Lee, has answered our call and come onto the *AEA* Board as Director of Administration. Welcome and thank you for taking on this responsible position, Kam. We also appreciate the wealth of experience you bring to the Board in the photography field, Kam.

For those with sharp eyes you may have noticed that we are no longer "calling for interest" in finding a Director of Promotion. We think we have already found him! At present we are negotiating with someone who has wide and deep experience in all fields of media. At present he is occupied with previous engagements but he is hoping to be available to come onto our Board in February, 2010. Check out our list of *AEA* Directors in the next edition of *ESK*!



# Vizito al Nov-Kaledonio

de Anthony Gaskell



Supre: Antonio ĉe la skerma konkurso.

Dum la lasta somerlernejo en Sidnejo, Patrick Neveux kaj Sandrine Martin diris al mi "kontaktu nin kiam vi vizitos nian insulon". Do, mi faris tion, kaj estis gasto de la Esperantomovado en Nov-Kaledonio.

Mi planis viziti al Nov-Kaledonio por partopreni en skerma konkurso. Mi kontaktis Pat kaj Sandrine, kaj ili preparis ege bonan tempon por mi. Mia ferio komenciĝis per la *Oceania Senior Championships*. Tio estis kie mi eraris. Mi kredis ke *Senior* signifas *maljunuloj*. Sed kiam mi eniris la konkursan halon mi tuj eksciis ke fakte *Senior* tiukaze signifas *supera*. Mi estis la plej aĝa, la plej malsperta ĉeestanto kaj la sola aŭstraliano tie. Mi malsukcesis en ĉiu lukto.

Ne gravis tamen. La resto de la ferio estis bonega. Pat kaj Sandrine organizis mian viziton tre bone, kaj mi loĝis kun esperantistoj ĉiun nokton. Mi tranoktis ĉe unu de la esperantistinoj kiu loĝis proksime al la halo en kiu la skermkonkurso okazis, kaj poste ĉe la domo de Daniel kaj Madeline. Ili loĝis en sia bieneto en la antaŭurbo kiu nomiĝas *Gadgi*.

Estis ĉi tie kie la anoj de la nov-kaledonia klubo havis sian renkontiĝon. Dek esperantistoj sidis ĉirkaŭ la tablo kaj babilis dum multaj horoj.

Pat kaj Sandrine estas tre aktivaj en la movado en Nov-Kaledonio. Ili komencis siajn agadojn antaŭ kvar jaroj ekde malgranda bazo. Nun la klubo havas pli ol 15 anojn. Li propagandis per televido kaj radiofono. Ili aperigas malgrandan reklamon je malmulta kosto en la nov-kaledonia ĵurnalo ĉiun semajnon. Haveblas plumoj, ĉapeloj, sakoj kun la nov-kaledonia Esperanto-simbolo, kiuj kutime estis donitaj al interesitaj personoj.

Mi rekomendas al ĉiuj ke ili vizitu Nov-Kaledonion – sed atentu – antaŭ via vojaĝo informiĝu pri la uzo de viaj kreditkartoj kaj via poŝtelefono tie. Nur unu el miaj du kartoj estis akceptita, kaj mi devis aĉeti novan SIM-karton. ★



*Supre: Antono babilas kun lokaj esperantistoj.*

# Kvargeneracia Esperanto-familio

de Katja Steele

**“Mi estis 11-jara  
kiam mi renkontis  
lin la unuan kaj la  
lastan fojon.”**

Dum la 2008a Oceania Kongreso en Aŭklando iu menciis al mi, ke la longhara junulino inter ni estas nepino de konata brita esperantisto John Rapley. Kiam dum iu ekskurso ŝi hazarde sidis apude, mi petis ŝian konfirmon pri la afero. Evidentiĝis, ke Janjo (per kompleta nomo Janjo Alena Cranefield) estas jam kvarageneracia esperantisto de sia familio. Jen sube, kion ŝi rakontis al mi.

#### La unua generacio:

Werner Munkelt estis instruisto, kiu krom Esperanto parolis ankaŭ aliajn lingvojn. Li vivis en Neustadt en Germanio. Mi estis 11-jara kiam mi renkontis lin la unuan kaj la lastan fojon. Li estis jam ege malsana.

#### La dua generacio:

Werner havis du filinojn: Helga (karesnome Jagi, kio en la familio signifis “dolĉaĵo”) kaj Petra (en la familio nomata Vermo). Jagi renkontis en la E-klubo de Londono junulon Norman Smith. Ŝi estis tre bela kaj multaj admiris ŝin, sed ŝi enamiĝis ĝuste al tiu Norman, kiu montris pri ŝi nenian intereson. Tamen, Jagi kaj Paki (la karesnomo de Norman) geedziĝis kaj loĝis dum certa tempo en Afriko. Paki instruis pri inĝenierado. El la geedziĝo naskiĝis du filoj: unue Petro Smith, mia posta patro, kaj Marko Smith. Ili ambaŭ estis denaskaj esperantistoj, dum longa tempo tute ne konis la anglan.

#### La tria generacio:

Marko estis instruisto pri matematiko en Anglio, nun li loĝas en Bissenburg, Alzaco. Li neniam edziĝis. Petro, mia patro,

edziĝis al Marion Cooper. Ŝi iomete lernis Esperanton jam antaŭ ol renkonti lin, sed la paro konatiĝis ne en Esperanta, sed en karateo-klaso. Kiam ŝi rimarkis la verdan stelon sur lia ĉemizo, ŝi demandis lin, ĉu li parolas Esperanton. Li respondis en rapida, flua Esperanto, el kiu ŝi apenaŭ komprenis ion.

La geavoj nomis mian patron Peĉjo, Peĉi, mian panjon Manjo. Mi naskiĝis en Britio (kaj havas britan pasporton), mia fratino jam en Novzelando, kien ni translokiĝis kaj kie miaj gepatroj daŭre loĝas. Mia patro parolis kun mi Esperanton de mia infanaĝo. Kiam mi estis 7-jara, venis al Novzelando niaj geavoj Jagi kaj Jani (John Rapley, la dua edzo de Helga). Mi lernis pli da Esperanto de ili. Sed ili restis nur 3 jarojn, nia hejma lingvo estis la angla. Paĉjo parolis Esperanton plej ofte kun mia patrino.

### **La kvara generacio:**

Krom kun mia patro mi neniam uzis Esperanton kaj kiam mi plenkreskis, mi multon forgesis. Iom mi lernis la lingvon el lernolibroj, sed neniam ĝis nun interparolis kun esperantistoj. Unufoje mi vizitis miajn geavojn en Kvinpetalo (proksimume en 1998), sed eĉ tiam mi ne parolis la lingvon. Jani instruis tie ornitologion kaj mia patro tajĉion.

Mia edzo Gareth, anglalingva novzelandano, lernis Esperanton nur antaŭ unu jaro dum la Somerkursaro en Tasmanio, ĉefe por plaĉi al mi. Nur en la pasinta decembro mi eksciis, ke la venonta Somerkursaro okazos en Aŭklando kaj ĉar nuntempe mi loĝas ĉi tie, mi aliĝis al la mezgrada kurso de la aranĝo. Mi komprenas Esperanton bone, necesa estas la praktiko de la parolado. Ĉar mi baldaŭ translokiĝos al Londono, mi uzos la tiean restadon por kontaktoj kun la lokaj esperantistoj. La kialo por esti flua en Esperanto estas, ke mi ŝatus havi dulingvajn infanojn, angla-Esperantajn. En nia etne ege miksita familio Esperanto estas la sola plurgeneracia tradicio. Mi mem havas sangon germanan, anglan, irlandan, skotan, francan, polan, hispanan, judan, kaj miaj bruna haŭto kaj hararo venas el Barbadoso.

Mia fratino estas bluokula blondulino. Same kiel mi, ankaŭ ŝi volas rehavi Esperanton, kiun ŝi perdis post la infanaĝo, kaj ankaŭ ŝi deziras havi dulingvajn infanojn. Ŝi lernis tri aziajn lingvojn, nun kaj ŝi kaj ŝia edzo lernas Esperanton. ★

**“En nia etne ege  
miksita familio  
Esperanto estas la  
sola plurgeneracia  
tradicio.”**

# Revekiĝo de Bjalistoko, Pollando

de Jennifer Bishop

Por *UEA* estis preskaŭ memevidente okazigi 94an Universalan Kongreson (*UK*) en ĉi tiu malgranda urbo pro la ege signifa evento de antaŭ 150 jaroj, nome la naskiĝo de Ludoviko Zamenhof. Tamen mi imagas ke por la urbestro estis grandega defio pro la malkutimo gastigi preskaŭ 2000 delegitojn de internacia kongreso. Ne necesis perturbiĝi ĉar la urbo prezentis sin per tre bonveniga mieno. La flagoj de Esperanto kaj Pollando kune dekoraciis la stratojn, alloga turisma broŝuro gvidis vizitantojn tra la stratoj al ĉiuj Esperanto-monumentoj kaj al kulturcentro *Centro Ludoviko Zamenhof*. La ĉefa renkontejo estas Esperanto-kafejo sur la ĉefa placo de la urbo-domo. Je preskaŭ ĉiu horo de la tago eblis renkonti tie esperantistojn por kafumi, trinki Esperanto-aperitivan aŭ manĝi.



*Supre: La ĉefa placo en la malnova urbo de Bjalistoko.*

La 94a *UK* kun la grava temo "Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ" okazis iomete for de la urbo-centro, ĉe la Politekniko de Bjalistoko. Tie troviĝis giganta tendo, *Zamenhof*, konstruita nur por *UK*. Granda nombro da partoprenantoj loĝis apude en studentaj loĝejoj sed aliaj gastis ĉe hoteloj en la urbocentro kaj devis aŭ promeni aŭ veturi per aŭtobuso al la kongresejo. Por mi kaj mia edzo promenado estas kutima frumatena ekzercado por fluigi la sangon. Ĉe *UK* ni vigle promenis antaŭ ol sidadi por ĝui Solenan Inaŭguron, aŭskulti tiom da interesaj kaj aŭskultindaj prelegoj, ĉeesti fakkunvenojn, kaj renkonti

samideanojn. Bonŝance la vetero ludis bonan rolon ĉar la suno brilis kaj malofte pluvetis kio refreŝigis la terenon, kaj la temperaturo estis ĉiam agrabla.

La programo sekvis la kutiman ritmon komencante en sabato per Komitatkunsido 1 sekvita de koncerto de la kantgrupo Asorti kaj de Movada Foiro kie ni dividis tablon inter *AEA* kaj *MEL* (Muzika Esperanto-Ligo). Poste ni ĝuis la unuan koncerton en *Zamenhof* kie Irena Urbanska kantis diversajn judajn kantojn. La granda distra programo dum la tuta semajno estis varia kaj

okazis en diversaj lokoj en la urbo. Ĉi tio ebligis ĉeestadon ankaŭ de la loka popolo, bona nova strategio por diskonigi nian lingvon.

En dimanĉo je 10.00 matene okazis la solena inaŭguro kie bonvenigis ĉiujn Probal Dasgupta, Prezidanto de *UEA*, Aleksander Sosna, Prezidanto de *LKK* (Loka Kongresa Komitato) kaj ĉiuj estraranoj de *UEA*, Prezidanto de *ILEI* kaj de *TEJO*. Ĉiam mi trovas tiajn oficialajn eventojn tre kortuŝaj kaj kuraĝigaj. Post du horoj la bunta plenplena programo komenciĝis kaj ĉiuj partoprenantoj kuris en diversaj direktoj por ne maltrafi la komencon de eventoj.

Kleriga Tago, Tago de la Lernejo, *IKU* (Internacia Kongresa Universitato), *AIS* (Akademio Internacia de Sciencoj), Cseh-Seminario, kursoj kaj ekzamenoj, Esperantologia Konferenco, oratora konkurso kaj artaj aranĝoj inkluzive de Internacia Esperanto-Ĥoro skizas la ĉefajn programkadrojn krom ekskursoj kiuj okazis ĉiutage ankaŭ dum merkredo libera tago.

En vendredo okazis *UEA*-Komitatkunsido 2, kiun mi ĉeestis por anstataŭi la reprezentanton de *AEA*, Miranda Lutz. Partoprenis 48 el la 78 reprezentantoj kio sufiĉis por krei kvorumon. Osmo Buller, prezidanto, Ĝenerala Direktoro de Centra Oficejo, komencis per honoriga diplomo por du membroj de pli ol 50 jaroj, Ulrich Lins kaj Renato Corsetti. Helen Fantom anoncis por la financa komisiono ke la jarkotizo de *UEA* altiĝos al 60 eŭroj por 2010. Osmo Buller anoncis ke li ferios kion li ne faris dum 5 jaroj. Per voĉdono estis akceptitaj du novaj membroj de *UEA* – Mongola Esperanto-Societo kaj Monda Asembleo Socia. Estis anoncitaj ankaŭ novaj membroj de la Ekzamena Komisiono kun la informo ke por instrui Esperanton necesas sukcesi en lingvo-ekzameno almenaŭ je nivelo *B2*. Estas emfazita ankaŭ kunlaborado inter landaj asocioj kaj *UNESKO*. Pro aliaj devoj miaj mankas informo pri Komitatkunsido 1, pri Solena Fermo, ĉiuj tre laŭdindaj prelegoj, fakaj kunvenoj, oratora konkurso kaj kelkaj distraĵoj, sed ĉiuj valoregas por montri la riĉecon de la Esperanto-kulturo.

La grava historio de Bjalistoko kiu ŝuldas multe al Familio Branicki de la 18a jarcento, nepre revekiĝis dum ĉi tiu semajno, kaj espereble la urbestro kaj liaj administrantoj povos profiti kaj fieri pri ĝi ankoraŭ dum almenaŭ 150 jaroj. ★



*Supre: La tendego Zamenhof kie okazis la inaŭguro de la UK.*



# La 94a UK en Bjalistoko

Du membroj de NZEA raportas:

Chris Krägeloh kaj Bradley McDonald

La 94an Universalan Kongreson (UK) de Esperanto ĉi-jare en Bjalistoko (pole: Białystok) ĉeestis du membroj de NZEA: Bradley McDonald kaj Chris Krägeloh. Pro la fakto ke en 2009 estis la 150a datreveno de la naskiĝtago de Ludoviko Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, la UK okazis en lia naskiĝa urbo, kiu nuntempe troviĝas en la orienta parto de Pollando, ne tre for de la landlimo kun Belorusio.

Post vizito al sia familio en Germanio, Chris flugis al Varsovio, kie li renkontiĝis kun Bradley. Antaŭ ol ili per trajno iris al Bjalistoko, Bradley kaj Chris kune esploris kelkajn vidindaĵojn de la ĉefurbo de Pollando, inkluzive la malnovan urbon kaj la tombon de Zamenhof.

La trajna vojaĝo al Bjalistoko funkciis ege glate, kaj niaj karaj NZEAanoj atingis la kongresan urbon unu tagon antaŭ la solena inaŭguro de la UK. La urbo

*Dekstre: La tombo de Luduviko Zamenhof en la juda tombejo en Varsovio.*





*Maldekstre: Bradley McDonald en la malnova urbocentro de Varsovio.*

salutis la vojaĝantojn varme per buntaj floraj aranĝoj kaj flagoj (inkluzive Esperantajn) ĉe la perono kaj en la stratoj de la malnova urbo.

Bradley kaj Chris ne bezonis longan tempon trovi iliajn loĝejojn kaj la kongreslokon – la politeknikan universitaton de Bjalistoko. Kvankam Bjalistoko ne estas malgranda urbo (la enloĝantaro estas proksimume 300.000), estas sufiĉe facile iri el unu loko al alia – per aŭtobuso aŭ piede.

La solena inaŭguro de la *UK* okazis en granda tendo starigita sur la tereno de la politeknika universitato. Bradley, kiu ĉeestis kelkajn *UK*ojn antaŭe kaj jam reprezentis Nov-Zelandon ĉe la oficialaj inaŭguroj, proponis ke Chris faru la taskon ĉi-jare. La oficiuloj, timinte

longajn, ripetajn kaj enuigajn paroladojn de la landaj reprezentantoj, petis ke ĉiu reprezentanto diru nur kelkajn vortojn, prefere salutvortojn en la koncernaj landaj lingvoj. En la suba foto vi povas vidi Chris alparoli la ĉeestantojn de la *UK* per la maoria saluto *kia ora* [kjora].

La kongresejo estis kunvena kaj atingebla el la diversaj loĝejoj aŭ piede aŭ facile per aŭtobuso. Je somera vetero (krom la fakto ke pluvis de tempo al tempo) oni povis piediri al la urbocentro, kie troviĝas la ĉarma malnova parto de la urbo kaj la diversaj vidindaĵoj rilataj al Esperanto kaj Zamenhof. Ofte oni renkontas la nomon de la iniciatoro de Esperanto kiel en la nomo de placo kaj strato dediĉitaj al li. En tiu strato estis la iama naskiĝdomo de Zamenhof, kiu nun bedaŭrinde ne plu ekzistas. Anstataŭ ĝi, oni nur povas vidi ŝildon, kiu montras la foton de la iama domo kun priskribo en la pola, Esperanta kaj angla lingvoj. La domo estis detruita en la 1950aj jaroj por konstrui apartamentojn. Unu el la apudaj apartamentoj nun havas murpentraĵon kiu montras Zamenhof starantan sur balkono, kiu, krom la ŝildo, montras la signifon de la nomo de la strato. La placo de Zamenhof estas nur kelkajn centojn da metroj for, kie troviĝas monumento de Zamenhof. Oni vere povas senti la fieron, kiun tiu



*Supre: Chris Krägeloh salutis la ĉeestantojn de la UK ĉe la solena inaŭguro.*




urbo posedas por ĝia fama urbano. Eĉ unu hospitalo en Bjalistoko nun portas la nomon de la iniciatinto de Esperanto.



*Supre maldekstre: La urbo-domo en la ĉefa placo de la malnova urbocentro de Bjalistoko. Supre dekstre: La murpentraĵo en la strato Zamenhof. Sube: Foto de la naskiĝdomo de Zamenhof.*



**Noto:** Pli mallonga versio de tiu artikolo jam aperis en la septembra eldono de la novzelanda bulteno *Arĝenta Filiko*.



## New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140  
Symonds Street  
Auckland 1035  
New Zealand

**[www.esperanto.org.nz](http://www.esperanto.org.nz)**  
[nzea@esperanto.org.nz](mailto:nzea@esperanto.org.nz)  
0800 350 781

David Ryan | President  
[ryangomez@xtra.co.nz](mailto:ryangomez@xtra.co.nz)

Chris Krägeloh | Vice-President  
[esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)

Donald Rogers | Treasurer  
[dero2648@clear.co.nz](mailto:dero2648@clear.co.nz)

Bradley McDonald | Secretary  
[bradley.m@whoosh.co.nz](mailto:bradley.m@whoosh.co.nz)

Howard Gravatt | Assistant Secretary  
[hgravatt@ihug.co.nz](mailto:hgravatt@ihug.co.nz)

Erin McGifford | Committee Member  
[Erin.mcgifford@press.co.nz](mailto:Erin.mcgifford@press.co.nz)

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the public about Esperanto, and organising the annual NZEA conference.



## Australian Esperanto Association

P.O. Box 339  
Pascoe Vale South  
Vic 3044  
Australia

**[www.esperanto.org.au](http://www.esperanto.org.au)**  
[info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au)  
(+61 2) 9319 4775

Dianne Lukes | President  
[prezidanto@esperanto.org.au](mailto:prezidanto@esperanto.org.au)

Kam Lee | Administrative Director  
[admin@esperanto.org.au](mailto:admin@esperanto.org.au)

Stephen Pitney | Financial Director  
[financoj@esperanto.org.au](mailto:financoj@esperanto.org.au)

Miranda Lutz | Dir. of Member Services  
[servoj@esperanto.org.au](mailto:servoj@esperanto.org.au)

Vacant | Dir. of Promotion  
[informado@esperanto.org.au](mailto:informado@esperanto.org.au)

Jennifer Bishop | Director of Education  
[edukado@esperanto.org.au](mailto:edukado@esperanto.org.au)

Yaw Ampomah Badu | Dir. of  
Implementation  
[utiligado@esperanto.org.au](mailto:utiligado@esperanto.org.au)

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



# FEED YOUR BRAIN ESPERANTO

Esperanto is a fascinating language. Some learn it for travelling, others for corresponding with penpals, or chatting to people from all over the world over the internet.

Others learn it just to exercise their brain.

**BRAINFOOD**

[WWW.ESPERANTO.ORG.AU](http://WWW.ESPERANTO.ORG.AU) • [WWW.ESPERANTO.ORG.NZ](http://WWW.ESPERANTO.ORG.NZ)

Due to its easy grammar and clever word formation system, you can learn Esperanto faster than any other language.